

# R

## RADIO

La revo de la e-istoj havi je dispono proprajn Eo-lingvaj R.-elsendojn estas malnova. Kiam meze de la 1920aj jaroj la ĝeneva radiopioniro → *Edmond Privat* (1889-1962) entreprenis R.-intervjuojn kun Radio Parizo kaj fondis Radion Ĝenevo, kie kunlaboris ankaŭ Paul Bouvier, la temo fariĝis tre aktuala. La unua internacia kongreso de la R. en aprilo 1925 enmetis en sian tagordon la demandon pri universala lingvo. Kaj la unua internacia kongreso de R.-amatoroj en Parizo adoptis Eon kiel internacian helplingvon en R.-interkomunikado.

La deziro havi proprajn elsendojn realiĝis en 1946, post kiam Edmond Privat, mem membro de la gvidaj instancoj de la svisa R., sukcesis konvinki la unuan direktoron de la kurt-onda servo Paul Borsinger kaj ties kunlaboranton Eduard Haas, ke Eo aldoniĝu kiel program-lingvo de ĉi tiu R.-stacio, kiu ekfunkciis en 1935. Sekve en 1946 Borsinger malfermis pordeton al Eo kaj komence koncedis al Privat elsendon kvin-minutan ĉiu-semajne en tiu lingvo. Tre bonvena por pruvi la taŭgecon de la nova lingvo de tiu R.-kanalo montriĝis la 32a UK, kiu okazis en 1947 en Berno. Apud Privat estis petita la juna zurika ĵurnalisti → *Arthur Baur* (\*1915), kiu tiam laboris kiel redaktoro de *Neue Berner Zeitung*, raportis ĉiutage dum dek minutoj pri la okazaĵoj de la kongreso kaj realigi intervjuojn kun eksterlandaj kongresanoj.

Dank' al la pozitivaj reagoj flanke de la aŭskultantoj de tiu nova programo, Borsinger konfidis al Baur, ekde la 6a de oktobro, prepari regulajn kronikojn kun la daŭro de po kvin minutoj pri temoj ĉirkaŭ svisaj institucioj kaj eventoj. Kelkajn jarojn poste la elsen-

doj povis plilongiĝi kaj ripetiĝi dufoje en la semajno. En printempo 1961 oni atingis stacion, kiu daŭris ĝis la 1980aj jaroj: estis disaŭditaj kronikoj po dek-minutaj kun po unu ripeto sur tri-ondo-longoj, kio rezultigis 40 minutojn en Eo ĉiu-semajne. Dum Privat traktis internaciajn kulturajn demandojn same kiel specifajn Eo-temojn, ĉerpante antaŭ ĉio el siaj personaj spertoj kaj travivaĵoj, la fokuso de Baur celis Svislandon, kies politikaj institucioj estis priskribitaj kaj klarigitaj aktualaj politikaj kaj kulturaj eventoj kiel ankaŭ la lingva situacio de Svislando. Baur karakterizis kantonojn kaj urbojn, iradis laŭlonge de riveroj kaj fervoj-linioj, paroladis pri ekspozicioj, festoj, arto, teatro, filmoj, kulturo, gazetaro, muzeoj ktp. La radia laboro de Baur kaj Privat efikigis ankaŭ aliajn fruktojn: De Privat aperis libroforme liaj rememoroj *Aventuroj de pioniro* (1962) kaj *Vivo de Gandhi* (1967). La R.-tekstoj de Baur kondukis al la fama libro *La fenomeno Svislando*, kiu en 1979 estis distribuita al la partoprenantoj en la lucerna UK. Plia kromrezulto de la prilingvaj elsendoj de Baur estis la verkado de kajero pri la romanĉa lingvo.


Kiel posteulo de Privat estis proponita la neŭŝatela gimnazia instruisto → *Charles Ecabert* (1913-62), kiu ankoraŭ en la sama jaro forpasis pro tragika akcidento. Lia posteulo fariĝis la neŭŝatela instruisto kaj e-isto → *Claude Gacond* (\*1931), kiu poste ankaŭ kun sia edzino *Andrée Gacond-Giroud* (\*1933) regule prizorgis la ĵaŭdajn elsendojn (kaj de 1985 ankaŭ la sabatajn), dum Baur, apogata de sia edzino → *Heidi Baur-Sallenbach* (1916-2006), daŭrigis la lundan kronikon pri aktualaj svisaj eventoj. Gacond ekstraktis ĝeneralajn prikulturajn temojn kaj demandojn de la utiligo de Eo kaj ofertis larĝan spektron de esperantologiaj, interlingvistikaj, homaranismaj, historiaj, literaturaj kaj pedagogiaj problemoj, realigante ankaŭ intervjuojn kun multaj svisaj kaj alilandaj e-istoj.

*Krizo kaj la sekvo*: Unua krizo aperis komence de 1965, kiam sub la direktoro Gerd Padel la Svisa Kurtonda R. interrompis la Eo-disaŭdigon pro „buĝetaj kialoj“ fone de la financa malekvilibro de la R.-stacio Schwarzenburg kaj ĉar la svisa registaro malpermesis altigi la koncesian kotizon. Sekve la di-

rekcio eliminis la Eo-elsendojn tre malvolonte, esprimante sian bedaŭron, kaj dankis al la Eo-redaktoroj kun la certigo, ke oni intencas repreni la lingvon Eo en la programon, kiam la tempoj pliboniĝos. Tuj sekvis impresa lavango de protestoj flanke de la aŭskultantoj, tiel ke post dek-monata sendo-paŭzo la direkto sub ties nova direktoro Joël Curchod petis la responsulojn de la Eo-sekcio repreni sian laboron en la 8a de novembro de la sama jaro 1965.



Supre: Heidi kaj Arthur Baur  
Sube: Claude kaj Andrée Gacond



En 1967 la elsendoj estis transprenitaj de la svisa telefona reto. Tio estis grava atingo, ĉar en multaj regionoj de Svislando la kurtaj ondoj de Schwarzenburg estis malbone aŭ tute ne aŭdeblaj. En 1972 Svisa Kurtonda R. longigis la elsendotempon de po ok al naŭ minutoj (en novembro 1978 eĉ al dek minutoj).

Ĝenerale la reagoj de la aŭskultantoj al la R.-elsendoj en Eo estis tre bonvolaj kaj pozitivaj. Dum preskaŭ neniam esprimiĝis kritiko

pri la enhavo de la elsendoj mem, la plendoj koncernis precipe la mallongecon de la elsendoj kaj la teknikan kvaliton. Enetere okazis granda konkurenco inter kurtaj ondoj, fortaj sendiloj forpuŝis la malfortajn, pro kio la svisaj kurtondoj iom suferis. Krome, depende de la regiono, sezono kaj sun-makuloj, la ricevo-kvalito povis varii. Gravas ankaŭ emfazi, ke la ĉefoj de la programoj donis al la redaktoroj absolutan liberecon, do neniam okazis enmiksiĝo aŭ provo influi per instrukcioj, ĉu ideologiaj ĉu politikaj. Tiel Baur kaj Gacond memoras, ke sub la diversaj direktoroj ĉiam regis tre agrabla labor-etoso. Cetere *Svisa R. Internacia (SRI)*, kiel la R.-stacio nomiĝis ekde 1978, estis entrepreno, kiu apartenis al la Svisa R.- kaj Televido-Societo (SRG/SSR); la ĉi-lastas estas organizita laŭ privata juro. SRI do ne estis ŝtata R., kvankam laŭ la koncesio de la svisa registaro SRI havas la taskon informi svisojn, kiuj vivas en eksterlando, pri la okazaĵoj en ilia origina patrujo kaj altigi la reputacion de Svislando en eksterlando. Dum la R. kaj televido SRG/SSR estas financataj el la koncesiaj kotizoj de la aŭskultantoj kaj spektantoj, plus el la enspezoj el la televida reklamo, la financadon de la SRI-programoj dividas SRG kaj la ŝtato, ĉar ili estas destinitaj por eksterlando, de kie ne venas licencaj pagoj.

Dum la 64a UK en 1979 en Lucerno Baur denove ricevis dek minutojn tage por kongresaj raportoj. Por tiu celo estis disponigita la studio de la regiona R. de centra Svislando, kiu troviĝis en la trafikmuzeo de Lucerno. Tiuj specialaj elsendoj efektiviĝis okfoje, ĉiutage je la 19a kaj 23a horoj. Iom post iom oni trovis ankaŭ pli konvenan elsendohoraron. Ekde majo 1985, kadre de nova program-koncepto, la Eo-elsendoj estis integritaj en la internacia sendo-pakaĵo kaj disaŭdiĝis ĉiutage ok fojojn kun unu ripeto sur pluraj ondo-longoj per antenoj direktitaj al ĉiuj kontinentoj. Krom lundo kaj jaŭdo (kun merkreda ripetado) la Eo-programo ricevis lokon ankaŭ en sabato, ekskluzive por Eŭropo, sen ripetado. Tiel en Eŭropo aŭdeblis R.-prelegoj en Eo dum 50 minutoj kaj tutmonde dum 160 minutoj.




Esperantlingva program-prospekto de SRI el la jaro 1985 (supre)  
 Oficiala siglo de SRI en Esperanto (meze)  
 La konstruaĵo de SRI en Berno (sube)

La tuta elsendotempo en Eo respegulis kvar (tri plus 1) procentojn de la tuta SRI-sendo-kapacito. Kun la aliaj lingvoj, uzataj de SRI (germana, franca, itala, angla, hispana, portugala, araba kaj romanĉa), ankaŭ la Eo-programo kun siaj aktualaj elsendohoroj kaj frekvencoj estis anoncita en la oficialaj prospektoj de SRI, redaktitaj parte en Eo. De tempo al tempo estis eldonitaj eĉ apartaj, koloraj faldfolioj en Eo, kaj la esperantigo de la nomo de la R.-stacio Svisa R. Internacia estis indikita krom sur la prospektoj ankaŭ sur la oficialaj korespondiloj. En 1974, 1980 kaj 1985 ĉi tiuj bele aranĝitaj program-kajeroj kun koloraj titolbildoj rakontis pri la stacio SRI kaj ties Eo-elsendoj, en 1982 Baur prezentis la svisan ekonomion, en 1978 kaj 1984 la temo estis Eo en Svislando; en postaj jaroj Eo ĝuis modestan gastu-rajton kadre de plurlingvaj broŝuretoj. Okaze de la centjariĝo de Eo en 1987 SRI aperigis nacilingvajn informilojn pri la historio de la Eo-elsendoj. Tiel ekzemple en 1988 alvenis 733 leteroj kaj kartoj, el kiuj 200 devenis el Pollando, Hungario kaj Ĉeĥoslovakio, 32 el Soveta Unio, 34 en GDR, 128 el Okcidenta Germanio, 92 el Britio, 30 el Francio, 25 el Italio. Malgraŭ la antenoj direktitaj al landoj transoceanaj, la korespondaĵoj estis malmultnombraj. Averaĝe la korespondaĵoj, kiuj koncernis la Eo-programon, ampleksis 3% el la tuta poŝtaĵo de SRI, dum la elsendo-daŭro de la Eo-programo ja havis proporcion de nur 1% de la tuta program-kapacito. Rilate al aliaj lingvoj, kiuj disaŭdiĝis al miliona publiko, la modesta Eo-programo do pruvis tre favoran kost-utilan rilaton. Krom tio, pro la registrado de grandparto de la Eo-elsendoj sur kasedoj, CDELI en La Chaux-de-Fonds povis konservi la sondokumentojn kaj disponigi ilin al interesataj pruntantoj.

En 1986 aliĝis al la redaktora kaj parolista kvaropo la universitata studento → *Andreas (Andy) Künzli* (\*1962). La juna kunlaboranto ekprizorgis kaj disaŭdiĝis parton de la sabataj elsendoj, kiujn afable cedis Claude Gacond al li. Künzli elektis plej diversan enhavon, ofte parolante pri Svislando kaj internaciaj temoj, serĉante kompletigan ekvilibron inter la program-konceptoj de Baur kaj Gacond. Aŭtune 1991 Künzli estis nomita oficiala posteulo de

Baur, kiu meritoplene demisiis de sia seninterrompa funkciado dum 44 jaroj.



Program-prospekto de SRI de la vintra periodo 1987/88 kun la foto de Arthur Baur

*Nova krizo kaj fino de la Eo-programo:* Sub la nova SRI-direktoro Roy Oppenheim, programestro Nicolas Lombard kaj marketingestro Walter Fankhauser kaj fone de nova financa premo, en 1991/92 reekflamis la diskuto pri la ekzistaro de la Eo-programo ĉe SRI. En unua paŝo kontraŭ tiu programo, en aŭtuno 1991, SRI decidis ĉesigi la produktadon de la sabataj elsendoj kaj fine de marto 1992 SRI elsendis la lastan Eo-disaŭdigon entute. Sed antaŭ ol definitive ĉesigi la tutan Eo-disaŭdigadon, SRI sugestis kiel alternativon eventualan daŭrigon de la Eo-programo en formo de transskriba kasedoservo, kiel tiu ekde 1971 ekzistis ankaŭ por aliaj lingvoj. Sekve estis lanĉita enketo inter la aŭskultantaro kaj aliaj potencialaj interesigantoj de la Eo-programo, R.-stacioj, asocioj kaj privataj. De ĉ. 1000 ricevintoj de tiu enketo en majo 1992 revenis nur kvardeko da respondoj, kion la direkto taksis ne sufiĉa por pravigi daŭrigon kaj pro tio komplete rezignis pri la kasedoplano. Multaj respondoj, precipe el Orienta Eŭropo, klarigis, ke ili ne havos la eblon aboni kasedojn. La abolo

de la Eo-elsendoj tamen provokis la reagon de 250 aŭskultantoj. Eĉ koncerna rezolucio de la UK en Vieno (1992) estis direktita al la R.-direktoj, sed ĝi restis senefika.

Formale teknikaj kaj financaj kaŭzoj (la ŝtato reduktis siajn pagojn al SRI) influis la decidon forstreki la Eo-programon el la elsendo-koncepto de SRI. En 1992 estis enkondukita nova elsendo-strukturo baziĝanta sur 15-minutaj sendunuoj, en kiu laŭdire Eo ne trovis lokon. Se oni konsideras la tiaman SRI-buĝeton de 20 milionoj da svisaj frankoj, oni povus kredi ke la elspezoj por la Eo-sekcio kun unu promilo de la tuta buĝeto vere ne povis ludi seriozan rolon de ŝpar-faktoro. Fakte tute alispecaj konsideroj estis decidaj, kiel konfesis la merkatestro de SRI en letero al la vic-prezidanto de SES, Fritz Liechti. Laŭ tio influis la decidon la mondscale reduktita signifo de la kurtondoj kaj la konkludo de SRI, ke post la fino de la malvarma milito (dum kiu SRI atingis 5-10 milionojn da aŭskultantoj), okcidentaj nacilingvoj, unuavice la angla lingvo, transprenis en Orienta Eŭropo la rolon, kiun ludis Eo aŭ deziris ludi (→ Tazio Carlevaro skribis en sia studo *Ĉu Eo postvivos la jaron 2045?*: „La Berlina muro, kaj entute la politika divido interne de Eŭropo, helpis Eon, ĉar ĝi kreis la iluzion, ke, malantaŭ la muro, la lingvo estas estimata kaj aplikata: eble eĉ estis iom tiel.“). La samajn vidpunktojn de SRI cetere reprezentis ankaŭ la Svisa Oficejo pri komunikado (kadre de la Departemento pri trafiko kaj energi-ekonomio), kiu en siaj korespondaĵoj konfirmis la decidon de SRI. La oficialan bedaŭron de SES pri la abolo de la Eo-elsendoj de SRI esprimis sekretario Andy Künzli en letero al la prezidanto de la Svisa Konfederacio, Adolf Ogi (vd. *SES informas* 2/1993, p. 8).

Post 70 jaroj da ekzistado, la kurtondoj, inkluzive de tiuj en la angla lingvo, estis definitive ĉesigitaj fine de oktobro 2004, kiel legeblis en informilo de SRI de tiu jaro. Bedaŭrante ilian abolon, en ĉi-koncerna gazetara komento direktoro Nicolas Lombard konfirmis, ke SRI, nomanta sin ekde kelkaj jaroj *swissinfo*, ĉiam dependis de la politika volo kaj ĉiam restos dependa de la politikistoj, kiuj nun decidis ne plu subvencii tiun R.-servon. La servo estis anstataŭita de la retujo [www.swissinfo.org](http://www.swissinfo.org). La 30an de oktobro 2004

la svisalemana televido en siaj novaĵoj informis la publikon, ke la sendostacio estas ĉesigita, pro la fino de la malvarma milito, pro la ekesto de novaj teknologioj kaj pro la monŝparado, kaj ankoraŭfoje menciis, ke SRI havis ankaŭ Eon en sia programo.



Ankaŭ kunlaboris ĉe SRI: Charles Ecabert (1962) kaj Andreas Künzli (ekde 1986)

*Valorpritaĵo:* Rerigarde al la 45-jara Eo-disaŭdigado ĉe SRI eblas konstati, ke tiu agado donis al la Eo-movado plurajn avantaĝojn: la elsendoj estis unika ŝanco utiligi Eon en amas-komunikilo kaj disvastigi la svisajn voĉojn tra la tuta mondo; ilia produktado estis unu el la malmultaj entreprenoj de e-istoj, kies sukcesa realiĝo ne dependis de amatoreca aŭ diletanteca Eo-organizaĵo mem, sed efektiviĝis en profesia kadro; multaj e-istoj estis informitaj kaj klerigitaj, la redaktoroj mem povis enprofundiĝi en interesajn kaj aktualajn temojn kaj prezenti ilin al internacia publiko. La R.-laboro ligis kompetentajn Eo-movadanojn kontrakte kun signifa landa R.-stacio, kiu garantiis al ili adekvatan honorarion oficiale antaŭviditan por tiu speco de ĵurnalisma aktiveco. La Eo-elsendoj celis esti fenestro por la komunisme regataj landoj en Orienta Eŭropo (sed ne nur), ili servis kaj plenumis ĉi tiun taskon brile, trafe kaj sukcese.

En sia komento pri la nova politiko de SRI sub la titolo „Fine miskomprenis la R.“ (LF 143/1993) →Giorgio Silfer interpretis la sintenon de SRI tiel, ke ĝis 1991 al SRI interesis la orienteŭropa merkato, ekde 1992 ne plu.

Ĉu do la lingvo Eo vere estis ankaŭ (mis)uzata kiel instrumento kaj lingvo de la propagando en la malvarma milito ?

*Aliaj R.-stacioj:* Krom la R.-elsendoj ĉe SRI estis faritaj aliaj provoj enkonduki Eon en R. SE 2/1936 raportis, ke la svisa R.-programkomisiono akceptis la proponon de la SES-estraro okazigi intervjuon pri Eo ĉe la zurika studio. Ŝajnas ke tiam kaptis la okazon paroli tra la mikrofono la tiama SES-prezidanto Rudolf Gottlieb Maeder (1900-40) el St. Gallen.

*Radio Lora en Zuriko:* Ekde februaro 1998 la zurika loka radiostacio Lora komencis disaŭdigi, laŭ la frekvenco de 97,5 MHz je la 15.20-a horo, kadre de la programo Anteno Literatura, elsendojn en kaj pri Eo. La programo estis kaptebla en la zurika regiono kaj povis esti aŭskultata de proksimume du milionoj da homoj. La ĉefa publiko de R. Lora estas progresemaj intelektuloj kaj politike aktivaj homoj kaj eksterlandanoj vivantaj en Zuriko kaj ĝia regiono. La Eo-elsendon redaktis Jan Stanisław Skorupski (\*1938), pola poeto, kanzonisto kaj plastikisto, e-isto vivanta en Zuriko, kadre de la pollingva programo de la sendilo. Unue estis produktita de Skorupski la unuhora pola programo Polska Antena Literacka, en kiu troviĝis 15 minutoj por Eo. Laŭ lia libro *Akurat* la unua Eo-elsendo estis realigita la 14an de februaro 1998, kaj de ĉi tiu dato estis preparitaj du apartaj programoj duonhoraj: Polska Antena Literacka kaj Esperanto Sonas Poeme. Skorupski ĉesis gvidi la antenan programon je la 14a de februaro 2003, sed vere la plej lasta antena programo estis sendita iam en 2004 okaze de la Lora-jubileo (la preciza dato ne plu estas konata).

→Politiko



## **Karl REUTEMANN**

1910-1979

## **Lina REUTEMANN-KLEE**

1917-1993



Post la vizito de la bazaj kaj duagradaj lernejoj en St. Gallen kaj la porknabina mezlernejo kun diplomo en mastrumado kaj kun pliklerigaj kursoj en privata faklernejo, Lina R. laboris en privataj domoj, en sanatorio por malsanuloj je tuberkulozo, en maljunulejo por blinduloj kaj en la hotelfako; poste ŝi transiris al la flegado. Dum la dua mondmilito ŝi kunlaboris kun la civila virina helpservo. Lina R. lernis Eon en 1933 (atesto pri lernado, supera ekzameno de SES en 1949). Kiam la tiama prezidanto de EK St. Gallen, →Hans Kürsteiner, prezidis ankaŭ UEAn, R. kunorganizis lokajn, regionajn kaj landajn kunvenojn, feriosemajnojn, prelegvojaĝojn por eksterlandanoj ktp. En 1963 ŝi mem fariĝis prezidantino de EK St. Gallen (poste ĝia honora membro). En 1939 ŝi aliĝis al KELI kaj en marto 1951 kunfondis la svisan KELI-sekcion. Dum la 1940aj jaroj R. apartenis al la CK de SES (1992 honora membro) kaj de 1961 estis UEA-delegitino en sia urbo. Ŝi ofte verkis artikolojn por diversaj gazetoj, donis multajn kursojn por komencantoj kaj progresintoj, skribis la nekrologon pri la mortaj klubanoj, partoprenis en multaj lokaj, landaj kaj internaciaj Eo-kunvenoj kaj korespondis kun multaj gesamideanoj.

Ŝia edzo *Karl R.* (1910-1979) laboris kiel dungito de firmao pri hejtado-aerumado. En sia junaĝo li partoprenis Eo-kurson. Post la interkonatiĝo kun sia onta edzino li aliĝis al EK St. Gallen, SES, UEA kaj KELI, sukcesis en la supera diplomo de SES kaj en la 1970aj jaroj estis ankaŭ ano de la ekzamena komita-

to de SES. En la novembra kaj decembra numeroj de *SE* 1976 aperis lia artikolo pri la ŝanĝo de la tempoj inter 1910 kaj 1975.

→St. Gallen →Kristanoj

## **Serge REVERDIN («Parzival»)**

\*1942. Loĝas en Biel-Bienne BE



Post la matematika-naturscienca gimnazio en Bazelo, kie li faris la abiturientan ekzamenon, R. komencis studi fizikon kaj matematikon en la svisa politeknika altlernejo (ETH) en Zuriko dum tri jaroj. Rezigninte pri tiu studo, li fondis ekologian taksio-koooperativon en Bazelo. Afliktata pro la militoj en la mondo, R. sentis sin destinata por defendi la pozicion de pacaktivulo. Fakte li deziris fari sian armedeĵoradon ĉe la blukaskuloj de UN, sed tio estis rifuzita de la svisaj aŭtoritatoj. Komence de sia kvara arma ripetkurso li blue kolorigis sian kaskon kaj kun UN-flago en la manoj publike postulis en la bazela stacidomo la aliĝon de la svisaj soldatoj al UN. Sekve li ekhavis konflikton kun la justico kaj psikiatrio, kvankam R. ne eksplicite proklamis sin rifuzanto de la arma servo, sed kiel defendanton de la tuta homaro. En la psikiatra prizono de Cery ĉe Prilly/VD, kie R. restadis kvin jarojn, li alproksimiĝis al la baha religio, en kiu li trovis la konfirmon de siaj ideoj pri la paco en la mondo. La 1an de septembro 1983, kiam en unu el liaj sonĝoj aperis la ĉefa figuro de la mezepoka versromano de Wolfram von Eschenbach (ĉ. 1170-1220), R. eknomis sin „Reĝo Parzival“ (la bahaanoj malpermesas al li porti la nomon reĝo) kaj proklamis sin mondcivitano. Sub tiu pseŭdonimo R. iĝis konata pro siaj iom sensaciaj agadoj. En sia

libro (1992) la *Nebelspalter*-aŭtoro Hans A. Jenny portretis R. kiel svisan originalulon.



R. lernis Eon en la psikiatrejo. Kiel konvinkita naturprotektanto li komencis perbicikle veturi tra la mondo varbcele por Eo kaj siaj pacamaj ideoj. Kelkaj ekzemploj: en 1975 li biciklis dum du jaroj tra 12 landoj ĝis Abiĝano en Afriko, uzante memeldonitan „universalan pasporton“. La celo de la vojaĝo estis proponi la kreon de multtrasa reĝlando en Sudafriko. Abunde la gazetaro raportis, post kiam R. en 1976 estis akceptita de la nederlanda reĝino Juliana, kiun li volis persvadi lerni Eon. Kiam R. en 1977 alvenis en Niameo, ĉefurbo de la afrika ŝtato Niĝero, por protesti kontraŭ la Apartheid-reĝimo en Sudafriko, por edzinigi nigran principon kaj sin proklami kiel reĝon de suda Afriko, la gazetaro denove abunde skribis prie. En 1981 R. instaligis antaŭ la UN-palaco en Ĝenevo kun la celo diskuti la mondlingvan problemon kun la konferencantaj edukministroj. Sed liaj klopodoj doni provlecionon en Eo al la UN-konferencanoj kaj instrui Eon al la irana revolucia ĉefo Aĵatollah Ĥomejni fiaskis same kiel lia sugesto al la ĉina registaro subskribi la „luo“-kontrakton kun Hongkongo en Eo. En 1982 R. aperigis anoncojn sub la titolo „Energiministerio de reĝo Parzival“ en *Bieler Tagblatt*, (24.8.), kiu nomis lin „Kavaliro de la ekologia biciklo“ (14.9.1983). En 1983 R. ekeldonis internacian horloĝ-gazeton kun la titolo *Bonan Tagon*. Per tiu agado R. volis popularigi la ekologian horloĝ-komercon kaj pruvi al la mondo, ke Eo estas taŭga internacia komercolingvo. Tiel efektiviĝis la cirkulado de horloĝoj kun la

surskribo ‘Bonan Tagon’. Inter multaj aliaj ideoj R., kiu eknomis sin „arkonida kapitano“ (ankaŭ „kapitano Bonan Tagon“), dediĉis sin pli kaj pli al la imago pri „spacoŝipo parkita malantaŭ la planedo Pluto ĝis kiam Unuiĝintaj Nacioj estos elektintaj unikan laborlingvon“. Laŭ propraj klarigoj la anoj de tiu spacoŝipo havas la taskon pretigi konferencon pri monda mono kaj monda lingvo (R. inventis la fikcian „Eo-monon“ kaj sugestis apliki ĝin al GATT kiel mondomono, t.e. 1 Espero = 1 horo da laboro de bona Eo-instruisto). R. esprimis sin konvinkita, ke se Eo estus akceptita de la plenasembleo de UN, la fundamento por la surtera paco estus metita. Kiam en oktobro 1983 P. estis letere alparolita de la francaj aŭtoritatoj per „civitano“, R. ĉesis konsideri sin sviso. En 1984 R. komencis nomi sin „naturkuracisto“ kaj ŝajne ankaŭ agi kiel tia. Sed la justico vokis lin aperi antaŭ la neŭŝatela tribunalo, kie oni klarigis al li, ke li malrespektis la leĝon pri la praktikado de kuracprofesioj kaj agis kontraŭ la regularo pri la reklamado por medicinaj kaj paramedicinaj profesioj. Anstataŭ serioze konsideri tiun akuzon R. prelegis en la juĝejo pri la mortado de arbaroj. La loka gazetaro detale raportis pri tiu incidento kaj menciis nature ankaŭ Eon.



Kun sia fikcia Centro Lidja Zamenhof en la „gente duonigita urbo Bielo“, „d-ro Klimato“, kiel R. ankaŭ nomas sin, eldonis kaj daŭre eldonas kaj dissendas multajn flugfoliojn kaj malfermajn leterojn kaj prezentas siajn kreaĵojn ankaŭ en diversaj artekspozicioj. En siaj flugfolioj R. atakis i.a. la usonan imperiismon, kiu laŭ li kulpas pro la altrudo de la angla lingvo al la homaro. En 1995 li

sugestis konvoki Eo-kongreson kun la partopreno de Jelcyn kaj Dudaev, prezidantoj de Rusio kaj Ĉeĉenio. Okaze de la UK Berlino (1999) li sugestis la deziron, ke Bill Clinton kaj Saddam Hussein subskribu la t.n. „bibliokoranon“. Krom politikaj R. alprenis ankaŭ moralajn vidpunktojn. Lige kun iu murdo en la svisa urbo Zug en la sama jaro R. pledis por la fideleco en seksaj rilatoj inter geedzoj, alvokis la svisan parlamenton krei novan koncernan leĝaron kaj invitis la parlamentanojn lerni Eon. Post la jaro 2000 la korespondaĵoj de R., kiujn li sendadas nun ankaŭ kun la subskribo „Faraono de la verda ŝuo“ precipe al KCE kaj CDELI kaj verŝajne ankaŭ al aliaj adresoj, alprenis pli kaj pli bizaran karakteron.



En 2001 R. esperis, ke Nepalo akceptos lian „Espero-Paco-Planon“, ke maoistoj kaj hinduistoj unuiĝos en la lukto kontraŭ la alkohol-drinkado kaj ke Nepalo fariĝos senalkohola lando. En aliaj leteroj R. esprimis inviton al George Bush kaj Saddam Hussein por ke ili renkontiĝu kadre de la monda poŝtorganizo por adopti la mondmonosistemon ‘Espero’.

Por komuniki, ke li estas preta atesti pri la senkulpo de Osama Bin Laden antaŭ la internacia tribunalo, R. sendis vortaron Eo-araban al Carla del Ponte, ĉefakuzantino ĉe la Internacia Tribunalo pri militkrimoj en eksa Jugoslavio en Hago. Ŝajnas ke R. eĉ sentis kontentiĝon pri la atencoj kontraŭ la „simboloj de la usona imperiismo“ je la 11a de septembro 2001. En 2003 R. kulpigis la bahaanojn pro la morto de la sveda ministrino pri eksteraj aferoj Anna Lindt. Nomante sin nun „La sperma trono de la Unika Dio“, kiu ne dezi-

ras presitajn varbilojn en sia leterkesto kaj kiu pledas por la futuro sen petrolo, R. invitis la publikon diskuti kun li tion kaj jenon en la restoracio de Migros en Bielo. En 2004 li anoncis prelegon pri „La faraono kaj la mobiltelefono“.

La biografio de R. aŭ la kazo R. eble estus malpli signifa, se de tempo al tempo la lokaj gazetaroj (*Via/SBB* 1994, *National-Zeitung* 1975, *Bieler Tagblatt* 1997, *Der Bund* 1999 ktp.), radio aŭ televido ne raportus pri lia agado kaj tiel ne mirigus la perpleksigitajn legantojn aŭ aŭdantojn, kiuj miskomprenas la aferon de Eo. Ĉar R. ankaŭ ne hezitis kontakti diversajn politikistojn kaj administrajn altrangulojn, kiuj kelkfoje kompleze respondas al li, estis necese jam plurfoje, ke la responsuloj de la Eo-movado, observante la agadon de R. kun teruro kaj zorgo, devis interveni ĉe la instancoj, kiuj estis kontaktitaj de R., por korekti la bildon kaj la informojn pri Eo kaj por esprimi la plenan distanciĝon de la aktivecoj de R.



*Familia kunteksto:* R. estas la nevo de Olivier Reverdin (1913-2000), kiu estis konata personeco: profesoro en la ĝeneva universitato kaj grava reprezentanto de la liberala movado en Ĝenevo; en 1955-70 li estis membro de la parlamento de Svislando, unue kiel nacia konsilisto, poste kiel membro de la konsilio de kantonoj. Kiel ano de la parlamenta delegacio en la asembleo de la Eŭropa Konsilio li



restis la sola sviso, kiu iam prezidis tiun instancon. Li prezidis ankaŭ la Svisan nacian sciencan fondaĵon kaj multajn jarojn laboris kiel ĵurnalisto ĉe la pinto de *Journal de Genève*.

### **Gonzague de REYNOLD**

1880-1970

R., filo de nobeloj, estis konata romanda aristokrato el Friburgo, katolika intelektulo, patriota verkisto, konservativa ĵurnalisto kaj historiisto, dekstre orientita politikemulo. Li laboris kiel universitata profesoro pri romanistiko kaj franca literaturo (en Berno kaj Friburgo).

R. elstaris kiel la plej prominenta - kaj tre influa - svisa kritikisto de Eo. Fifama en planlingvaj medioj fariĝis lia polemiko kontraŭ la neŭtrala universala lingvo en →Ligo de Nacioj (LdN), kie li povis libere kaj senskrupule esprimi sian malŝaton kontraŭ Eo kaj malhelpi rezolucian proponon favoran al la eventuala internacia agnosko de Eo.



Gonzague de Reynold (kiel universitata profesoro en 1922 kaj dum kostumbalo en 1929)

Post la fondo de LdN en 1920 en Ĝenevo R. fariĝis la oficiala reprezentanto de la svisa registaro kaj ĝenerala raportanto en la *Komisiono pri Intelekta Kunlaboro* de LdN. Laŭ iniciato de →Edmond Privat, kiu submetis al Ligo de Nacioj rezolucian proponon rilate la enkondukon de la Eo-instruado en la lernejojn de la membro-ŝtatoj, ĉi tiu Komisiono ricevis en aŭtuno 1922 la taskon de la Kvina Komitato de la Tria Asembleo de LdN studi

la demandon de la neŭtrala universala lingvo. Al tio R. reagis malfavore kaj esence kaŭzis, ke lia Komisiono alprenis negativan decidon pri la rekomendo de Eo aŭ ajna internacia planlingvo.

La malŝato de R. al Eo kaj neŭtralaj universala lingvoj havas interesan antaŭhistorion. Okaze de la 2a UK en Ĝenevo en 1906 en la kultura-literatura revuo *La voile latine* (La latina velo, 1904-10), kiu traktis specife svissajn temojn kaj motivojn, aperis akra kaj ironia pamfleto direktita kontraŭ Eo sub la titolo 'A propos de la langue Espéranto, dite langue universelle'. La artikolon aŭtoris la konata ĝeneva verkisto Charles-Albert Cingria (1883-1954), frato de la pentristo kaj verkisto Alexandre Cingria (1879-1945), kiuj estis personaj konatoj de R. En tiu kontribuajo la felietonisto Cingria moke rifuzis Eon kiel „rusan salaton”. Li komparis ĝin kun cigno komplete senplumigita kun forŝiritaj okuloj, kun vultura aŭ agla beko, kun piedostumpoj cikoniaj, kun pupilo de otuso. Cingria senskrupule primokis la mistikismon de la e-istoj, ilia lingvo signifis por li „katastrofon spiritan“. Por Cingria lingvo ne povis estis logika, ĉar la naturaj lingvoj kutime estas mallogikaj, kaj lingvo estas afero aŭ ilo kiu rilatas al natura popolo. La kongreson de la e-istoj li komparis kun „nomada akademio de la plebo, kiu estas anestezata, miopa kaj kiu havas ŝtopitajn orelojn“. La ĝeneva Eo-festo de 1906 reprezentis por li ne pli ol „senkoloran saŭcon“ kaj „iluzion de triumfo de utopio“ (lia sola ekzemplo pri la lingvo, kiun li prezentis en la artikolo, estis riĉega je eraroj, kaj liaj lingvistikaj klarigoj abundis je tradiciaj antaŭjuĝoj; →Antologio).

*Argumentoj kaj kritiko de R. kontraŭ la internacia planlingvo kaj Eo:* En longa duparta artikolo aperinta en *Bibliothèque Universelle et la Revue de Genève* (majo kaj junio 1925) R. konfirmis, ke la Komisiono pri Intelekta Kunlaboro de LdN ricevis la taskon studi la demandon de la neŭtrala universala lingvo. La raporto, en kiu R. analizis la internacian lingvoproblemon kaj provis kritikon de la internaciaj planlingvoj ĝenerale kaj de Volapük, Eo, kaj Ido aparte, estas en si mem leginda kaj estus eĉ pli konsiderinda, se ĝi ne estus tiom plena de antaŭjuĝoj nesciencaj

same kiel la dubinda beletra kontribuado de Charles-Albert Cingria.



Charles-Albert Cingria ĉirkaŭ 1947  
(foto de Henriette Grindat)

R. ja komprenis, ke la multeco de la vivantaj nacilingvoj, la malfacileco de iliaj gramatikoj, vortaroj kaj prononcoj, fine la rivaleco inter la popoloj, kiu daŭre malhelpus ilin akcepti la hegemonian pozicion de alia popolo aŭ lingvo, estus la kialoj por pravigi la ekziston de strikte neŭtrala universala helplingvo.

La kritiko de R. kontraŭ Eo havas do grandparte emocian karakteron. Li opiniis, ke neŭtrala universala lingvo, se ĝi ne estas nacilingvo, almenaŭ ne rajtas esti simpligita sistemo, reduktita al mekanika sintakso kaj malriĉa vortaro. Ĝi devas esti egalvalora kaj egalriĉa al unu el la naciaj „lingvoj de la civilizo“.

La planlingvojn R. konsideris kiel „antitezon” al la vivantaj lingvoj, kiuj apartenis por li al la kategorio „tezo“, dum la ‘duonmortaj’ kiel la latina aŭ greka estis la „sintezo“. La artefaritaj lingvoj reprezentis por R. la spiriton abstraktan, logikistan, matematikistan; por li tiu spirito apartenis al la pensmaniero de la kleruloj, kies kutimaj rimedoj de esprimado estus la signoj, la ĉifroj, la figuroj, la pazigrafioj, la nomenklaturetoj. Adeptojn de tiaj lingvoj li nomis „aktivaj, kelkfoje nediskretaj fanatikuloj“, „utopiistoj, internaciistoj, ĉiuj tiuj en kiuj la ideologio de la 18a jarcento pludivas”. Tiajn lingvo-konceptojn R. atribuis al la prefero de „duonintelektuloj” kaj al tendencoj romantikaj, al tiuj kiuj „revas pri la feliĉo realigita dank’ al la progreso, pri la definitive unuigita kaj pacigita homaro”. Kaj:

„La artefarita lingvo prezentas sin kiel tre simplan recepton por atingi la oran epokon.” Kvankam R. konfesis, ke planlingvo havas iajn avantaĝojn por la lerna proceso kaj eĉ atribuis al Eo pedagogian funkciecon, samtempe li vidis en tio „nur iluzion“, danĝeron por la „alta kulturo“ (por kiu la moderna, t.e. supraĵa kaj pigra homo ne taŭgas) kaj riskon por la tradukado de la ideoj.

Entute R. estis konvinkita, ke artefarita lingvo estas danĝera pro ties elementoj „heterogenaj, neorganaj, inerciaj, pasiv-materiaj“. Lia esenca kritiko pri Eo ampleksis jenajn opini-elementojn: „Kio do estas Eo? Kiam oni unuafoje aŭdas ĝin paroli, oni tute ne havas malagrablan impreson; male: ĝi estas lingvo dolĉa kaj monotona pro la akcento ĉiam fiksita (sur la antaŭlasta silabo). Kontraŭe la impreson, kiun oni ricevas legante ĝin, estas multe malpli favora: la vortoj ne estas malkonataj, sed ili faras la impreson de vortoj latinidaj vestitaj slavmaniere. Se oni volus doni al Eo geografian situon, oni devus loki ĝin ie inter Rumanio kaj Ukrainio, kiel lingvo kun latina origino, sed forte markita de la rusa kaj pola kun elementoj germanaj kaj eble orientaj. Fakte ĝi estas konfuzaĵo kiel ĉifra lingvo. [sekvas lingva ekzemplo en Eo kun eraroj]. La aspekto de Eo estas decide bizara - por ne diri barbara: oni troviĝas en stepo, en lingvistika stepo. (...) Eo estas kompromiso. Ĝia strukturo alproksimiĝas al la ĝermanaj kaj slavaj lingvoj, la vortaro al la latinidaj lingvoj. Zamenhof komencis per la strukturo, forte neglektante la vortaron: per tio li faris bazan eraron. Li provis konstrui strukturon ekstreme simplan, nevarieblan, skemisman. Tiu principo faras, ke Eo troviĝas ankoraŭ inter la aprioriaj lingvoj, la kodoj. (...) La alfabeto kaj la prononcado, sekve ankaŭ la ortografio, estas vere malfacilaj. (...) Sed la granda invento de Eo estas la sistemo de nevarieblaj sufiksoj, de kiuj ĉiu signifas alian vortkategorion. (...) Koncerne la sintakson, necesas mencii la aplikon de la akuzativo (...). Per tiu sistemo pruntita el la latina, la frazkonstruo restas libera. Kiel oni vidas, la strukturo de Eo estas kombinita por esti maksimume simpla, regula. Ĉio reduktiĝas al skemo, kaj oni ne povus nei la lertecon de Zamenhof: li bone aranĝis interne sian ludilon („joujou”), per kelkaj feraj dratoj. Kaj la

ludilo funkcias. Eo paroleblas, legeblas, skribeblas, kompreneblas, disvastiĝas. La pupo marŝas, malfermas kaj fermas sian okulojn, diras ‘paĉjo’ kaj ‘panjo’ kaj ankoraŭ aliajn aferojn. Al multaj tio ŝajnas miraklo, la ‘e-ista miraklo’. (...) Restas por ekscii, *kiel* la pupo marŝas, *kiel* Eo funkcias: la *kialo* ne sufiĉas al ni. Por komenci, okulfrapas, ke la alfabeto de Eo neniel estas simpligo, nek rilate la alfabeton francan aŭ germanan. Ĝiaj akcentitaj konsonantoj pruntitaj el la slavaj lingvoj estas komplete senutila komplikaĵo. El tio rezultas la malfacileco de la prononco kaj ekstrema malharmonio. (...) Serĉante la idealan simplecon, Zamenhof faris la saman eraron kiel Volapuko: li kripligis la radikojn [sekvas kelkaj ekzemploj]. (...) La elekto de la radikoj estis ofte farita kun totala malkompreno de la efektiva signifo, ni diru eĉ koncerne la moralon de la vortoj [R. elektas la ekzemplojn patro/patrino - patr/matr, kritikante la derivadon de la ina el la vira sekso]. (...) La neprecizeco kaj la povreco de la Eo-vortaro estas fonto de sennombraj konfuzoj. (...). Ĝi ne estas alproksimiga lingvo. Oni povas ĉion traduki en Eon, sed oni nenion povas esprimi en ĝi. (...)“ (trad. aK)

Kvankam R. agnoskis kelkajn avantaĝojn de Eo, la konkludoj de R., kiu envicigis la internaciajn planlingvojn inter la „infanaj lingvoj”, estis detruaj kaj kulminis en la juĝo, ke tia „lingvo tiom nepreciza, tiom barbara, kiu kreas konfuzojn kaj detruas la senton pri la valoro kaj beleco de la vortoj”, ne povas esti rekomendata, ja la uzado de tia artefarita lingvo devas esti malkonsilata, ĉar la rezultoj de la instruado de tia lingvo estus „damaĝaj”. Por R. Eo signifis ne nur „efekton kaj kaŭzon de la intelekta dekadenco,” sed ĝi respegulis sistemon „totale nesufiĉan“. Kiel bibliografia bazo por la kritiko de la planlingvoj servis la opinioj de Joseph Vendryes (1875-1960), konata franca lingvisto kaj disĉiplo de Antoine Meillet. Vendryes ne kredis en la sukceson de planlingvoj.

Dum ankaŭ la lingvon Volapük R. nomis „barbara”, eĉ „negra“, pri la idista reformprojekto R. agnoskis, ke ĝi ja liberigis Eon, kiu „falas en malkoherecon”, de la „empirismo”, de siaj slavaj influoj, de la pezaj aj/oj-diftongoj kaj de la n-akuzativo en Eo. Tial Ido estis deklarita de R. kiel supera al Eo, sed

la idistojn R. suspektis kiel „disidentajn e-istojn“. Kompare kun Eo tekston en Ido li trovis „pli klara” kaj „pli estetika”, malpli „kruda” [kaj li aldonis tekstan specimenon en ambaŭ lingvoj]. Laŭ R. Ido tamen ne povis sukcesi, ĉar ĝi estis racia kaj sistema inventaĵo, ĉar intelektuloj-scienculoj liberigis ĝin de ĉia „mistika etoso” tipa por Eo kaj pro tio ke Ido reduktis siajn ambiciojn sole al instrumento helpa kaj traduka. Ĝuste pro tiuj kialoj Ido ne povis kontentigi la „utopiistojn” kaj „duonintelektulojn”, kiuj per tiu lingvo ne povis fari la same bruajn propagandon kiel per Eo, kiu por altnivelaj homoj estas ridinda, sed facile penetras en la amason. La lukton inter e-istoj kaj idistoj R. komparis kun la batalo de la arioj kontraŭ la ortodoksoj, de la „fundamentistoj” kontraŭ la reformistoj. Zamenhofon li nomis „Mesio” kaj Eon speco de „mumio”, kiu „disfalas en polvon”, se oni tuŝas ĝin. La e-istoj do kondukis same doktrinece kiel la „hispanaj inkvizitoroj”, kaj ili ankaŭ trovis la kialon, kial ili volas benigi sian „dialekton” fare de Ligo de Nacioj: „Jen kial ili bezonas hodiaŭ oficialan benon kaj tiom arde postulas ĝin de Ligo de Nacioj. Ilia idealo estus decido de la Asembleo por oficiale rekonigi ilian dialekton [kiun ili nomas] internacian lingvon kaj protekti ĝin kontraŭ falsadoj. Jen kial ili tiom riproĉas al la Komisiono pri Intelekta Kunlaboro ties negativan antaŭdiskutan vidpunkton. Nesamopinio eĉ plej hezitema ilin furiozigas, ĉar ĝi timigas ilin: ĝi antaŭsignalas neeviteblan diserigon (resp. organizan disfalon).” Kaj aliloke R. skribis: „Supozi ke per dekreto de Ligo de Nacioj (...) oni likvidus la naciajn kaj naturajn lingvojn por anstataŭi ilin per artefaritaj lingvoj, oni tute ne plibonigus la lingvistikan situacion de Eŭropo.” (trad. aK)

La konstantan aperon de novaj projektoj kiel Esperantido (de René de Saussure), Esperido, Nepo ktp. R. devis konsideri kiel absurdajn renversojn tipajn por la planlingva movado. Krome montrante la evoluon de Volapük al Occidental, R. kredis esti pruvinta, ke la naturalismo en planlingvistiko estas neevitebla.

Do alternative R. proponis, krom la konsidero de la en LdN jam taŭge aplikataj lingvoj franca kaj angla, enkonduki la „modernan latinon”, favore al kiu li verkis ardan pledon en sia raporto, sen konfesi, ke reale ĝi estas

morta lingvo. R. trovis ĉiam denove blasfemajn aŭ kondamnajn vortojn pri Eo, kiu en la pritakso de R. estis nur laŭŝajne civilizita kreaĵo, kiel ekzemple la jenajn: „Se ekzistas unu provo de lingvo internacia, kiu kapablas regresigi la homaron, tiam precize estas Eo, kiu rekondukas al formoj aglutinaj kaj nefirmaj indaj en la ŝtonepokaj tempoj (...).” Kaj koncerne la elekton de neŭtrala universala lingvo R. venis al la definitiva konkludo, ke „la artefaritajn lingvojn necesas ekskludi, precipe la senforman kaj barbaran Eon, kies adopto estus malfeliĉo por la intelektuloj, la instruado kaj la alta kulturo.“ Kaj li ripetis, ke poste, „kiam oni studos nian epokon, oni vidos en tiu utopio de la artefarita lingvo putran formon de la idealismo, signon de konfuzo, simptomon de dekadenco.”

Pri la latina lingvo R. komentis, ke ĝi tute ne estas morta kiel oni ĝenerale asertas. Pasié omaĝante la gloran pasintecon de la latina lingvo kiel internacia lingvo de la scienco, filozofio, kristanismo, eklezio, klerularo, politikistaro, diplomataro, nobelularo, kiel lingvo skriba, literatura kaj parola, uzata de vastaj tavoloj en plej diversaj landoj kaj kiel studfako daŭre instruata, R. glorigis la latinan kiel „brilegan instrumenton de la intelekta progreso por la tuta mondo“ kaj de la „popolaj liberecoj“ (li referencis ekzemple al Magna Charta). Samtempe li emfazis la grandegan valoron edukon de la latina lingvo, ĝian universalecon kaj ĝian elstaran signifon por la kulturita civilizo.

Kompare kun la franca lingvo, la angla lingvo havas laŭ R. tri avantaĝojn: la avantaĝo lingvistika por esti ekstreme simpligita lingvo, la avantaĝo politika por esti parolata de pli ol 120 milionoj da homoj (tiam) kaj la avantaĝo ekonomia por fariĝi pli kaj pli la lingvo de la komerco en la tuta mondo. La anglan lingvon R. laŭdis, ĉar ĝi forlasis sian gramatikan balaston kaj ĉar ĝi realigis nekutiman simpligon, kiun eĉ inventantoj de artefaritaj lingvoj ne povus imagi. La solan malfortan punkton de la angla R. vidis en ĝia ortografio. Pro kulturhistoriaj kialoj R. ne volis rezigni pri la prioritato de la franca lingvo, same ne pro ĝiaj prestiĝo kaj internacia influo, kiun ĝi ankoraŭ havis en la tempo, kiam R. elpuŝis sian kritikon kontraŭ Eo kaj la neŭtralaj universalaj lingvoj. Aliflanke la malfacilan or-

tografion de la franca lingvo R. konfesis kiel obstaklon.

*Rebato kaj pritakso:* La argumentoj de R. estis firme rebatitaj de →René de Saussure en *Bibliothèque Universelle et La Revue de Genève* (septembro 1925), sed la redakcio distanciĝis de liaj vidpunktoj. Kaj la argumentado de R. poste perfekte servis al la propagandistoj de la lingvo Occidental-Interlingue, la citaĵoj de R. eĉ aperis en traduko en ilia organo *Cosmoglotta* (1937). Interlingue-Union orname reĉerpis la konkludojn de R. de 1923, kiam oni klopodis malbonigi Eon ĉe la ĝenerala sekretario de UN en Nov-Jorko (1966).

La eldiroj kaj konkludoj de R. pri Eo kaj la internacia helplingvo do akre kontrastis kun la pozitivaj konsideroj de tiom elstaraj svisoj kiel →Ernest Naville, →Auguste Forel, →Emil Frey, →Pierre (kaj Daniel) Bovet, →Eugène Failletaz, →Arnold Bohren, →Edmond Privat kaj nelaste →Ferdinand de Saussure, kiuj publike apogis Eon, pritaksis ĝin ebla kaj inda aŭ parte eĉ aktive partoprenis en la Eo-movado. R. estas do impresa ekzemplo, ke antaŭjuĝoj surbaze de blinda malŝato kaj kulturpolitika fanatiko povas mallumigi eĉ la plej kleran intelektan spiriton, kia R. sendube estis, kaj ke tio povas endanĝerigi, eĉ faligi studindan projekton antaŭ internacia instanco kaj ankoraŭ longe resoni kiel malhelpaj argumentoj, uzataj ankaŭ de la konkurenco de Eo.

*Kelkaj aspektoj de la personaj kultura, socia kaj politika kunteksto de la kritiko de R.:* Socie originanta el la franclingva kulturkunteksto kaj ankrita profunde en la antaŭmoderna latin(ist)a-okcidenteca mondo, R. dekomence malfidis ĉiujn tendencojn ligitajn kun la evoluo de la moderna epoko. Precipe li abomenis la liberalan ŝtatsistemon, kiu ekde 1848, la jaro de la fonda de la Svisa Konfederacio, ekformiĝadis, postulante la restaŭron de la malmoderna svisa ŝtato en formo de helveta monarkio sub katolika patricia gvido, prefere aŭtoritata-totalisma ol demokratia. En la Komisiono pri Intelekta Kunlaboro de LdN, kies universalecon R. reve imagis kiel platformon por la revivigo de pli fruaj katolikaj ‘imperioj’ laŭ la modelo de la Sankta Roma Regno, R. ne nur kontraŭbatalis Eon, sed iusence misuzis sian



pozicion por doni decidan rifuzon ankaŭ al ĉiaj demokratiaj Eŭropo-ideoj, kvankam oni atendis de li kaj de lia komisiono ĝuste la defendon de la eŭropa pacordo de post la unua mondmilito.

La kontraŭdireco kaj la komplekseco de la personeco kaj de la pens- kaj agstrukturoj de R. estas fakte perfekta. Komence R. laboris en porpacaj medioj, estante ankaŭ en kontakto kun la pacaktivuloj Romain Rolland (1866-1944) kaj →Edmond Privat (1889-1962), kun kiu R. laboris favore al la liberigo de Pollando. Ekde 1911 la ideologia pozicio de R. pli kaj pli firmiĝis en la direkto radikaldekstre-naciista, kontraŭ-liberala kaj kontraŭ-demokratia. Pluraj el liaj praparencoj estis militistoj, kaj R. mem volis fariĝi oficiro, kiel li mem konfesis. La kulpon por la mondo simpligita, kunigita kaj vulgarigita li vidis en la internaciismo kaj demokratio; ĉi tiujn fenomenojn R. konsideris kiel veran katastrofon. La unuan mondmiliton R. bonvenigis kiel rimedon por korekti la „erarojn” de 1848, kiel okazon por proklami la pereon de la liberalismo kaj por restarigi la svisan ŝtaton de antaŭ la tempo de la franca revolucio. La ĉefideologo de la t.n. neohelveta naciismo aŭ helveta aŭtoritatismo publike kaj en diversaj artikoloj simpatiis kun la ĉirkaŭanta totalisma Eŭropo, en kiu marŝalo Józef Piłsudski (1867-1935) de Pollando, sed precipe Benito Mussolini (1883-1945) de Italio kaj António de Oliveira Salazar (1889-1970) de Portugalio estis liaj idealuloj kaj personaj kvazaŭamikoj; en iliaj aŭtoritataj diktaturoj faŝismaj R. trovis varmegan akcepton, ĉefe en Portugalio. Salazar eĉ tiom plaĉis al li, ke R. diris en 1938, ke li ŝatus fariĝi lia svisa analogio. Laŭ R. la socio povis esti savita nur tra la dogmoj de la katolika eklezio. Diversaj dekstremaj intelektuloj kiel la francoj Arthur Gobineau (1816-1882), Maurice Barrès (1862-1923) kaj Charles Maurras (1868-1952) trovis la nepran admiron de R. En 1932 R. danĝere alproksimiĝis al la dekstrema Nacia Unio (UN) de Georges Oltramare (1896-1960), en 1934 R. eĉ fariĝis membro de la faŝisma internacio CAUR. Tamen necesas aldoni, ke la italan faŝismon R. neniam konsideris kiel modelon aŭ opcion por la renovigo de Svislando, ŝtato kiun li cetere nomis la plej eŭropecan inter ĉiuj ŝtatoj.

Konsekvence R. rifuzis la bolŝevismon (kiel „kontraŭ-eklezion”) kaj la rusan revolucion de 1917, kiuj signifis por li danĝeron por Okcidenta Eŭropo. En unu el siaj libroj li deklaris la sovetian reĝimon kiel verkon de satano, en Sovetunio li vidis specon de „Kontraŭ-Eŭropo”, fakte refalon en la „integran aziismon”. Reĵeti la komunismon signifis por li defendi kaj savi la okcidentan-kristanan civilizon. En siaj friburgaj lecionoj R. pentris negativan bildon pri Ruslando kaj komparis ĝian historion kun longdaŭra barbareco, la rusoj estis por li primitiva tribo, same la hungarojn, rumanojn kaj bulgarojn li malalte taksis. La militon de la nacisocialistoj kontraŭ Sovetunio li principe subtenis. Li ĉiam kredis, ke pro la malvenko de Germanio en la unua mondmilito kulpas judoj kaj marksistoj. En la tridekaj jaroj en Goebbels li kredis vidi „kulturan viron”, en Hitlero eĉ „grandan personecon”, aliflanke R. ne apogis la hitleran nacisocialismon kaj plene rifuzis la rasbiologie pravigitan antisemitismon, liaj kontraŭjudaj antaŭjuĝoj ekscesis supozeble ne pli ol kadre de la ĝenerala kaj tradicia kontraŭjudismo de katolikoj. R. ĝuis la simpatian de la svisaj registaranoj Philipp Etter (1891-1977), Marcel Pilet-Golaz (1889-1958) kaj Giuseppe Motta (1871-1940). R. mem revis esti elektita en la svisan parlamenton aŭ registaron, al kiu li en 1940 rekomendis, ke Svislando devus plibonigi siajn rilatojn kun la Tria Regno, kvankam li ne kredis en ĝian sukceson, kaj rezigni pri la strikta neŭtraleco. El ĉio tio estas klarigebla ankaŭ lia malŝato de ĉio maldekstra, framasona, juda, socialista, de la psikiatrio, la reformo de la seksa moralo, la marksismo kaj la kapitalismo, sed ankaŭ de la ateismo kaj la moderna arto, la ĝenerala bonfarta eŭforio, la amaskulturo kaj la progresanta vulgariĝo de la vivo – ĉion tion R., kiu evidente fartis malbone en la industria epoko, kondamnis kiel dekadencan, herezan kaj danĝeran. Ankaŭ la amerikan kontinenton kaj Usonon li ne kapablis - aŭ ne deziris - kompreni, kvankam en 1949 R. vojaĝis tra latinida Sudameriko. Pro la pli kaj pli ofta kaj senĝena publika polemiko en la berna universitato, kie R. docentis inter 1915 kaj 1931 pri franca literaturo, kondamnante la fundamentojn kaj atingojn de la moderna liberalisma ŝtato, en 1925

unu el la socialdemokratoj de la berna parlamento komencis vidi en la agado de R. subfosan danĝeron por la demokratia sistemo. Inter 1928 kaj 1930 la premo kontraŭ R. flanke de la politiko kaj gazetaro konstante kreskis, tiel ke la „malamiko de la demokratio“, kiel R. estis nomata, devis alfronti la riproĉon, ke li misuzas sian katedron por disvastigi reakciajn ideojn. Kiam en 1930 alia grupo de bernaj parlamentanoj postulis esplori la instruagadon de R., kaj kiam fine en novembro de la sama jaro la liberaldemokrata partio de Berno postulis la demision de R., la atakata kaj en sia honoro profunde vundita kaj ofendita, sed de multaj studentoj tamen daŭre ŝatata friburga patriciano cedis, forlasante la protestantan Bernon kaj akceptante vokon de la katolika universitato en Friburgo, kie li devis sin senti pli hejme kaj kie li povis daŭrigi sian laboron ĝis la pensiigo. Kiam la lavango de kritikoj kontraŭ R. etendiĝis ekster Berno, ekzemple flanke de komunistaj fortoj komence de la 1940aj jaroj kaj flanke de la vaŭda psikiatro Oscar Forel, filo de →Auguste Forel, ĉar R. intertempe pledis por la abolo de la svisa nacia konsilantaro (li sugestis, ke nur la konsilio de la kantonj estu politike decidpova), R. pli kaj pli izoliĝis kaj retiriĝis de la publika agado politika. Oni ja atribuis al li diversajn altajn premiojn, kaj en 1955 la friburga universitato proponis lin eĉ kiel kandidaton por la nobelpremio.



La maljuna Gonzague de Reynold

R., kiu en la 1920aj jaroj sugestis ekzemple ankaŭ la aliĝon de Vorarlbergo al Svislando kaj kiu apogis la ideon doni al la retoromanĉa lingvo la statuson de kvara nacia lingvo de Svislando, aliflanke reprezentis sufiĉe kseno-

foban sintenon vidalvide de eksterlandaj enmigrintoj. La pli kaj pli grandan alfluan de fremduloj, precipe en Ĝenevo, R. observis kun abomeno - tiujn homojn R. ne hezitis nomi „sklavoj“, „barbaroj“, „elementoj“, „parazitoj“ ktp. R. ja komprenis ke ne eblas forpeli ilin de Svislando kaj tial li favoris ilian transformadon en „bonajn svisojn“ por solvi la problemon. Konsekvence, en la diskuto pri la aliĝo de Svislando al la tuteŭropa merkato R. montris sin skeptika, eĉ rifuzema.

→Ligo de Nacioj →Antologio

### **RIKA METODO**

→**INSTRUADO DE Eo**

→**Marc ROHRBACH & movado J.E.A.N.**

### **Marc ROHRBACH & movado J.E.A.N**

La filozofieca J.E.A.N.-movado, mallongigo por „Juneco spirita, Edukado de si mem, Ardo en laboro, Nobleco kondukta“, estis fondita de *Marc Rohrbach* (1904-1993) kaj disvastigata precipe en Francio kaj Svislando. La movado J.E.A.N. celas antaŭ ĉio pliboniĝon de la interhomaj rilatoj kaj kreas pensmanieron, aplikante i.a. dietopedion, jogon kaj pedeŭtikon. En 1927 R. starigis la fundamenton por la Instituto J.E.A.N. en Lyon (Francio). Post la dua mondmilito la J.E.A.N.-movado estis restarigita en Ĝenevo kaj Parizo. R. mem iam estis la sekretario de loka grupo de Kristana Unuiĝo de junaj viroj (YMCA). De 1926 li dediĉis sin al psikologiaj esploroj, laborante en parizaj malsanulejoj. Pluraj e-istoj originas el la J.E.A.N.-medio, ekzemple Lucienne Dovat-Clément (\*1919), Danièle Bignens-Volpé (\*1930). Mathilde Lüthi, →Marcel Jaccard, Jean-Jacques Lavanchy (\*1934), Gisèle Weill-Schneck (1912-2004), Armand Cotton en Ĝenevo, ges-roj Fink en Yverdon, ges-roj Jean Waldvogel k.a.

R. lernis Eon kun Lidia Zamenhof por efektiviĝi la pedagogiajn celojn de la J.E.A.N.-movado kaj por kultivi la logikan pensadon. En Eo-medioj lia *Rika metodo* trovis iugradan intereson kaj estis eksperimente aplikata i.a. en KCE, precipe de Lucienne Dovat. Aliflan-

ke Eo helpis diskonigi la verkaron de Rohrbach, kiu estis ankaŭ konsilanto de KCE.

→ Instruado de Eo en Svislando



Marc Rohrbach en 1938 kaj kun Joseph Volpé



Gisèle Weill-Schneck, Lucienne Dovat-Clément kaj Danièle Bignens-Volpé

### **LA ROMANĈA (KAJ ESPERANTO)**

En 1938 la R. lingvo estis konstitucie proklamita kiel la kvara nacia lingvo de Svislando. La svisa konstitucio de 1999 preskribas, ke „en la uzado kun personoj de R. lingvo, ankaŭ la R. estas oficiala lingvo de la Konfederacio”, apud la germana, franca kaj itala lingvoj. En la kanton Grizono la Konfederacio estas devigata subteni rimedojn por la flegado de la R. lingvo.

En Svislando la grizona R. lingvo estas parolata de ĉ. 35'000 personoj kiel ĉefa lingvo (jaro 2000). Ĝi dividiĝas en kvin dialektoj: Sursilvan, Sutsilvan, Surmiran, Puter, Vallader (la du lastaj estas konataj ankaŭ sub la nomo Ladin).

En 1982 la zurika lingvisto Heinrich Schmid (1921-1999) kreis por la R. lingvo la gvidliniojn por la t.n. komuna skriblingvo Rumanĉ Griŝun (Rumantsch Grischun). Ekde tiu jaro tiu planita lingvo estas la oficiala

lingvo en la korespondado kun la R. popolo en Grizono kaj Svislando. La reagoj al tiu projekto (kun la celo savi la R. lingvon) en la R. popolo mem estis diversa: de akceptemanta entuziasma ĝis ege rifuza sinteno. Sufiĉe grandaj grupoj, kiuj parolas alian specon de la R. lingvo, vivas cetere ankaŭ en Dolomitoj kaj Friulo (Italio).

La unua konata presaĵo, en kiu la R. kaj Eo renkontiĝis, estas la ŝlosilo *Clev da l'Esperanto*, kiu aperis en la konata serio de Eo-ŝlosiloj inter la du mondmilitoj. Ĝia aŭtoro estis Jon Vital-Vital en San Murezzan (germanlingve: St. Moritz). En 1938 sekvis la Eo-traduko de ampleksa eseo pri la R., kiu estis verkita de la konata engadina verkisto Peider Lansel. La tradukon faris → Hans Jakob, tiama direktoro de UEA, kiu publikigis siajn verkaĵojn sub la pseŭdonimo Georgo Agricola. La traduko aperis unue en la revuo *Esperanto* kaj poste kiel aparta dudekpaĝa broŝuro.

En la jaro 1939 aperis la → *Svisa Antologio*, kiu enhavis originale verkitan eseon pri la R. literaturo kaj multajn tradukaĵojn el ĝi. La Rn. pritraktas ankaŭ unu ĉapitro de la libro de → Arthur Baur, *La fenomeno Svislando* (1979). En novembro 1958 la revuo *Esperanto* publikigis la originale verkitan artikolon de Arthur Baur *La kvara lingvo de Svislando*. De la sama aŭtoro aperis en *SER* (n-ro 9/1981) artikolo pri la danĝera situacio de la R. kaj, samloke en aprilo 1983, kontribuado pri la nove kreita komuna skriblingvo Rumanĉ Griŝun sub la titolo 'La plej nova lingvo de Eŭropo'. La saman temon Baur traktis ankaŭ en la *Gratula Libro* por Régulo Pérez. La libro de Arthur Baur *La Retoromanĉa - Historio kaj nuntempo de la kvara nacia lingvo de Svislando*, kiu detale pritraktas la R. lingvon, aperis en 1995 kiel tria eldono aktualigita kaj ampleksigita en la mikro-eldonejo 'Hans Dubois' en Bellinzona (Svislando).

Aliflanke la R.-lingva gazetaro kelkfoje raportis pri Eo, nelaste dank' al la klopodoj de Arthur Baur, kiu disponis ĵurnalistajn ligojn. Tiel povis aperi artikoloj en *Engiadina* (19.4.1988), *La Pagina da Surmeir* (30.7.1985, 30.8.1985, 13.5.1988 kun la Eo-himno en R. traduko; 28.7.1988), *Fögl Ladin* (36/1969, 14.9.1979,

30.11.1984), *Gasetta Romontscha*  
 (13.9.1966, 25.8.1978, 13.7.1979,  
 20.11.1984), *Il Chardun* (12/1985).  
 → Bibliografio → Grizono



Romanča (ladina) eldono de la Eo-ŝlosiloj

## Cezaro ROSSETTI

1901-1950



R. estis la plej aĝa infano de tiĉinaj gepatroj (Aquilino Rossetti el Biasca/TI kaj Angelina Valentini el Ponto Valentino/TI, Val Blenio), kiuj elmigris al Britio, kiam Cezaro estis 16-jara.

Laŭ priskribo de lia frato → Reto Rossetti, kiu kiel li mem restis svisa civitano, R. estis la pli inteligenta kaj pli iniciatema inter la fratoj. En la vivo R. vivtenis sin plej diversmaniere: li kuiris hotele, restadis kvin jarojn en Bombajo (Hindio), rilatis kun varimportisto ktp. Ĝuste tiu homtipo servis al li kiel ĉefa figuro de lia sola, tre sukcesa originala romano en Eo, *Kredu min, Sinjorino* (1950). Aŭtobiografie interese kaj distre verkita, ĝi rakontas la aventurojn de agento, kiu klopodis vendi sian komercvaron. Ĉar R. malŝategis surpaperigi siajn tekstojn, la verko produktiĝis finfine nur post multaj komence vanaj instigoj fare de Reto. La libro, kiun R. mem prijuĝis „senblaga“, aperis ankaŭ en la hungara traduko de Sándor Szatmári (1897-1974) kaj estis eldonita en 20'000 ekzempleroj. Krome ekzistas tradukoj pola (de Jerzy Grum), angla (de Reto Rossetti) kaj japana (de Kaŭaj Toŝiro). Kiel Reto raportis, lia frato estis verva, diboĉe amuza rakontisto kun vivoĝua, imagoriĉa, humurplena karaktero, aparte ema je la absurdo; li societemis, donjuanis (sed kiel R. mem konfesis, neniam estis fitrompema). Malŝatante rutinon kaj ripetiĝon de la vivo kaj laboro, li facile majstris personajn krizojn kaj malfacilajn problemojn. Tute malavara li neniam akaparis monon.

La du fratoj lernis Eon en 1928 el pure teoria intereso, sed poste ĉiam korespondis en Eo kaj tre ofte kune parolis ĝin. En 1929 ili aliĝis al la edinburga SAT-grupo kaj adeptis en la socialista laborista partio. La filo de R., Arturo, same iĝis e-isto, kaj ankaŭ lia vidvino iom ekaplikis la lingvon. Kiam Cezaro observis la penan konversaciadon de Eo-kurskomencantoj, li deklaris ironie: „Jes, Eo ja estas mirinda lingvo, per kiu la homoj el la sama lando ne povas kompreni unu la alian!“




Libroj de Cezaro Rossetti kaj Reto Rossetti



## **Reto Mario ROSSETTI**

1909-1994



Reto R. estis tiĉin-devena sviso, poste li fariĝis brita civitano, loĝanta de frua infanaĝo en Britio (gepatroj vd. →Cezaro R.). Profesie R. laboris kiel universitata lektoro pri edukscienco kaj artpedagogio en Bristol (Britio), kiel estro de fakultato pri artpedagogio, kaj kiel docento en la Arta Kolegio en Birmingham.

R. aliĝis al Eo en 1928 kaj fariĝis elstara Eo-verkisto kaj -literaturisto, kiu verke estis multe pli produktiva ol lia frato Cezaro. Li dediĉis sian vivon al Eo kaj, dum jardekoj, kontribuis al la literaturo kaj kulturo de la internacia lingvo. Tion li faris ne nur per siaj poemoj kaj noveloj, sed ankaŭ kaj ne malpli per siaj multnombraj eseoj kaj artikoloj en diversaj revuoj. Ambaŭ fratoj R. apartenas al la klasikuloj de la Eo-literaturo.

Post la eldono de lia poemkolekto *Oazo*, aperinta en *Kvaropo* (1952, dua eld. 1977), eliris de li la poemaro *Pinta Kraĵono* (1959), enhavanta i.a. la *Jubilean Eposon*, la unuan versforman historion de la Eo-movado. Lia poemaro krom en *Kvaropo* aperis ankaŭ en *Literatura Mondo* kaj *Norda Prismo*. La poezion de R. karakterizas altnivela elegantecekvilibro. Memanalizoj profundaj, kiel ĉe William Auld, ne estas troveblaj ĉe R. Li estas iom ironia, sed neniam cinika aŭ morda, kaj la vivekzista problemoj ŝajne ne tiom koncernas lin kiel poeton; li preferas analizi la momentan homkondiĉon (*EoeP*).

R. aperigis ankaŭ novelojn. Pere de la novela libro *El la Maniko* (1955), kie li prezentas skizojn en vigla kaj riĉe esprimpova familiara stilo, ŝuldata al lia speciala lingvotalento (*EoeP*). Precipe en la peco *Francisko la fuŝulo* montriĝas la gracia leĝero kaj vicleco,

plasta karakteriza kapablo de la aŭtoro. En *Banu vin, mia bela* delikatas facile aluda erotiko. La Eo-literatur-kritikisto Sten Johansson ([esperanto.net/literaturo](http://esperanto.net/literaturo)) ne tre entuziasmas pri la noveloj de R. („R. ja tre aktivis kiel eseisto, redaktisto, poeto, didaktikisto kaj tradukisto. Sendube li pli gravis en tiuj kampoj ol kiel kreanta novelisto. La kartoj de R. ŝajnas al mi nek asoj, nek atutoj.“). Kunlabore kun Ferenc Szilágyi ĉe la eldonejo Stafeto en La Laguna de Tenerife eliris en 1964 la 328-paĝa mejloŝtona verko de R.: *33 rakontoj, la esperanta novelaro*. Temas pri klasika antologio de la Eo-prozo kun la publikigo de 33 noveloj de 29 aŭtoroj el 17 landoj. Aliflanke la verkon *Trezoro: la Esperanta Novelarto* (1989), kiun R. redaktis kun →Henri Vatré, Sten Johansson konsideras kiel nepraĵon por ĉiu Eo-biblioteko kaj kiel tre valoran fonton (tamen sen fontindikoj!) por ĉiu Eo-literaturemulo. Kiel kulmino de la literatura laboro de R. estas konsiderata la traduko de la tuta *Otelo* de William Shakespeare (1960), kiu estas brila ekzemplo de poezitraduka talento kaj forma kaj enhava fidelo (*EoeP*). Cetere R. realigis ankaŭ aliajn eminentajn tradukojn, cetere tute scenotaŭgajn, el Shakespeare, kiel la fragmentojn el *Romeo kaj Julieta* kaj el *Julio Cezaro* (kun la grandioza parolado de Antonio). Kun William Auld estiĝis la traduko de *Robert Burns: kantoj, poemoj kaj satiroj* (1977). El la skota lingvo R. tradukis *La iamo longe for* de Burns. Alia traduko, *La piratoj de Penzanco*, aperis en 1979.

Por la *Angla Antologio* (1957) R. prilaboris la prozan parton kaj brile tradukis kelkajn poemojn. La spiriton kaj eksperimentemon de R. pruvas liaj lingvaj ŝercoj, precipe lia studo pri vortludoj kaj la *Neologismologio*. En 1976, sub la titolo *Spegulo de esperantaj stiloj*, eldoniĝis volumeto de R., kiu ampleksas liajn 16 artikolojn, kiuj pli frue aperis jam en *HdEo*.

Ŝatata de la lernantoj estas ankaŭ la didaktika legolibro *Liza kaj Paŭlo* (1985), kiun R. pretigis kun aliaj. La lasta esea libro de R., *Arto kaj naturo*, aperis en 1989. R. estis ano de la Akademio de Eo kaj membro de EVA. 1954-55 li estis redaktoro de la revuo *Esperanto* (UEA) kaj kunlaboranto de *Literatura*

*Mondo* (dua kaj tria periodoj), *la nica literatura revuo*, *La Internacia Lingvo*, *Faktoj pri Eo* (1954). Lia prelego en la Somera Universitato en 1948 pri la kimraj artofestoj kondukis al la starigo de la Belartaj Konkursoj de UEA du jarojn poste, kiun R. ne nur iniciatis, sed kies konstanta sekretario li estis inter 1950 kaj 1953.

## **RUGA KRUCO**

Kiel *EdEo* rakontas, la iniciatinto de la aplikado de Eo ĉe la R., internacia organizo fondita en 1863 en Ĝenevo (Svislando), estis la franca e-isto kapitano Bayol. Post kiam li eldonis libreton pri Eo, kiu komencis cirkuli en la diverslandaj rondoj de la R., Eo ekpenetris en la naciajn societojn de la R., ekzemple en Belgio, Francio (1907), Germanio (Königsberg 1909) ktp. Dum la 4a UK en Dresdeno (1908) ĉeestis unuafoje oficiala reprezentanto de la Internacia Komitato de la R. Post la unua mondmilito Eo iom rolis en la 10a Internacia Konferenco de la R., kiun partoprenis preskaŭ ĉiuj registaroj de la mondo. La klopodoj puŝi Eon kondukis al rezolucio favora al Eo. Tiu rezolucio, kiu estis proponita de la ĉina delegito Wong kaj akceptita per voĉdono, havis jenan tekston: „Konstatinte la fakton, ke la lingva malfacilaĵo multmaniere malhelpas la realigon de l'internacia idealo de la R., ĉu por helplaboro sur batalkampoj, ĉu inter militkaptitoj aŭ eĉ en kongresoj de la R., la Xa Konferenco instigas ĉiujn R.-organizaĵojn, ke ili disvastigu la lernadon de la helplingvo Eo inter siaj anoj, kaj speciale ĉe junulaj sekcioj, kiel unu el la plej potencaj rimedoj al internacia kompreniĝo kaj kunlaborado laŭ la celo de la R.”  
→Edmond Privat ĉeestis la koncernan delegitaran kunsidon kaj publikigis la raporton en *Esperanto* (UEA), n-ro 5/1921.

En la postmilitaj UK Prago, Helsinki, Nürnberg kaj Vieno la R. estis reprezentita de *Rodolphe Horner* (1865/6-1927), iama internacia sekretario de la Kristana Unio de junaj viroj (YMCA) kaj aktiva ĝeneva e-isto.

Por la R. →Friedrich Uhlmann (1881-1938) verkis la vortaron *Deutsch-Esperanto-Wörterbuch für das Rote Kreuz* (Schussenried 1913).

→Ligo de Nacioj